5A JARO NOVEMBRO - DECEMBRO 2002 NUMEROJ 11-12


# TEA-BULTENO

## Novembra Programo en TEA

| | |
|---|---|
| Mar 05 nov | h. 20.00 - Komenciĝo de la unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 08 nov | Prelego: Primitiva nombrado |
| Mar 12 nov | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 15 nov | El Esperanta Gazetaro |
| Mar 19 nov | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 22 nov | Kartludado: Rumio kaj Trisepo |
| Mar 26 nov | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 29 nov | Brazilo, por ni!!! Diapozitivoj |

## Decembra Programo en TEA

| | |
|---|---|
| Mar 03 dec | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 06 dec | Filmo pri Brazilo |
| Mar 10 dec | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 13 dec | Zamenhofa Tago - Diapozitivoj de Anita |
| Sab 14 dec<br>Dim 15 dec | Zamenhof-tagoj en Izola, Slovenio<br>Pri detaloj informiĝu ĉe TEA-sekretario |
| Mar 17 dec | Unua-grada kurso de Esperanto |
| Ven 20 dec | Kristnaska Festo |
| Ven 27 dec | Jarfina tostado |



**Korajn bondezirojn de Feliĉaj Festotagoj!**

Ni revidos nin vendredon la 3an de januaro 2003!

En decembro ni havos plurajn kialojn por kunesti kaj pasigi kelkajn horojn en tre gaja kaj agrabla etoso. Tial, bonvolu ne malatenti ĉefe la ĉi-sube listigitajn okazontaĵojn:



1. **Zamenhofa Tago - Tago de la Libro**: ni kune rememoru nian Majstron, kaptu la momenton por aĉeti esperantajn librojn kaj, fine, n i ĝuu la diapozitivojn de Anita.



2. **Kristnaska Festo**: kiel jam tradicie, ankaŭ ĉijare nia kara Kristnaska Paĉjo vizitos nin (almenaŭ tion li promesis al mi persone!), kunportante multajn donacetojn por vi ĉiuj. Do, ne maltrafu ĉi feston: certe vi ne pentos!



3. **Jarfina festo**: kuntosti kaj kune adiaŭi la baldaŭ finiĝontan jaron estos ĉijare aparte grava por ni ĉiuj. Jam nun antaŭvideblas, ke la nova jaro kunportos kun si multajn novajn eblojn por aktivado en la informa kaj disvastiga kampoj, sed, bedaŭrinde, ĝi kunportos ankaŭ malnovajn, ne solvitajn problemojn, ĉefe tiun de trovo de taŭga sidejo por nia amata, preskaŭ centjaraĝa, Asocio. Do, ni pretiĝu alfronti vigle kaj kuraĝe la estontecon, kun enmane glason da freŝa, ŝaŭmanta vino en amika kunestado: se ni restos kunaj, certe ni kapablos realigi ĉiujn niajn revojn!

## Tea-Agado

Tre intense oni laboris en ĉi lastaj, pasintaj monatoj por pretigo de la **informa stando** okaze de ***Barcolana*** kaj por la ekspozicio "Filatelo-Historio-Esperanto", sinsekve okazintaj en la oktobra monato. Ekde la 10a ĝis la 13a de oktobro areto da volontuloj deĵoris, tuttage aŭ alterne, ĉe budo situinta marborde, en tre bela pozicio, antaŭ la kajo *Audace*. Oni disdonadis al la preterpasantoj milojn da informiloj, presitaj en multaj lingvoj, eĉ en triesta dialekto, kaj propagandis Esperanton i.a. per prezento de la televid-kurso MAZI EN GONDOLANDO. Multaj estis la interesiĝantoj, inter kiuj sufiĉe nombraj la junuloj: tio donas etajn esperojn ke por la kurso, kiu komenciĝos la 5an de novembro, prezentiĝos kelkaj lerno-dezirantoj. Pri la rezultoj ni ekscios venontsemajne. Ĉiukaze la TEA-estraro tutkore dankas la triestajn gesamideanojn kiuj sindoneme laboris dum multaj, sinsekvaj horoj en nia budo, kaj la amikon Gianfranco Tomba el Bolonjo, pro lia konstanta, tri-taga ĉeesto.

Tuj poste, ĉe la Centra Poŝtoficejo ni aranĝis en la koncernaj kadroj (dekses vitrinoj, ĉiu el ili enhavanta 9 foliojn) la materialon antaŭe jam preparitan por la ekspozicio **FILATELO-HISTORIO-ESPERANTO**, kies inaŭguro okazis la 17an de oktobro je la 10a horo, en la Konsilia Salono de la Poŝta Palaco. Ĝin ĉeestis d-ino Daniela Catone, reprezentanto de la direkcio de la Poŝtoficejo, kaj d-ro Nivio Covacci, ĵurnalisto kaj filatelisto. Post la bonvenigaj vortoj de la gastiganto, salutparolis Edvige Ackermann nome de Triesta E-Asocio: ŝin sekvis d-ro Covacci, kiu prezentis la ekspozicion de la filatelista vid-punkto. Venis ĵurnalistoj de TRIESTE OGGI, TELE4 kaj ANTENNA3: sekve de tio eblis spekti, samtage, du televidajn raportaĵojn dum, la sekvan tagon, aperis artikolo en TRIESTE OGGI.

La ekspozicio estos vizitebla ĝis la 9a de novembro.

## Poezia Angulo

De Pier Giorgio Soranzo

### Aútuno

Baldaŭ l'aŭtuno vivos
sian sezonon:
sezon' de l'silento,
ĉar mutaj estas la vortoj!
Ili rakontas niajn tagojn:
nia nekapablo komuniki
iĝas reverenca respekto
por l' aliuloj;
nia nekapablo aŭskulti
iĝas surdiga bruego de voĉoj,
kiuj estas konfuze kapricaj
kiel la ventoj
de l' printempo.

### Nostalgio

La tempo preskaŭ perdiĝas
en la longajn tagojn
de ĉi tiu varma somero.
Kaj en la daŭra sinsekvo
de l'silentaj horoj
dolĉe fariĝas sin luli
en la memoro de plaĉaj vesperoj.
eternaj preludoj de noktoj
kiuj nun iĝas detalo.
Kaj dum ĉi melankoliaj momentoj
Reaperas naivaj pensoj perditaj,
Tempo ne-tempo de l' nostalgio.

## *Tiel parolis la UEA-prezidanto, Renato Corsetti!*

(R)estu membro de la E-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas **esti** kaj **resti** membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nun samopinianta. Esence al la ĉiama demando: "Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobio, al Universala Esperanto-Asocio?" mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj.

La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon ESPERANTO per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin **aliĝi** aŭ **re-aliĝi** al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj - oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas "vastigi la komunumon", tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA
renato.corsetti@co.uea.org
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
tel. +31 10 436 1044; fakso +31 10 436 1751
retpoŝto uea@uea.org; TTT http://www.uea.org



## *Oni serĉas kaj serĉas...*

**Revizantoj serĉataj!**

La eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo (i.a. de Stafeto-libroj) ankoraŭ serĉas kelkajn fidindajn Esperanto-reviziantojn, kiuj pretas legi nove kompostitajn verkojn kaj elsarki kompost-erarojn. Por ĉiu revizanto ni antaŭvidas 2-3 manuskriptojn jare. Kandidatoj bv. skribi al:

Retbutiko de FEL - Frankrijklei 140
BE-2000 Antwerpen, Belgio
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be

**Ni serĉas desegnantojn kaj komiksistojn**, por projekto rilatanta humuron kaj komiksojn (bildstriojn) en Esperanto. Se vi estas interesata (aŭ konas iun tian), bonvolu skribi al la jena retadreso:

hodos@free.fr.

Por la projekto ni serĉas esperantistojn el multaj landoj.

**Lerneja klubo serĉas** kontaktojn! Lerneja Esperanto-klubo en Anglio serĉas alilandajn lernantojn por grupa

korespondado. Ĝi ankaŭ esperas partopreni en EUROSCOLA EN ESPERANTO en 2003 - http://e.euroscola.free.fr. Skribu al: Esperanto-Klubo (c/o Elizabeth Stanley), Sir Thomas Rich's School, Oakleaze, Longlevens, Gloucester, GL2 OLF, Anglio.

**Diverslandaj lipharuloj serĉataj!** "Les moustachus d'Alsace" (La Elzasaj Lipharuloj) estas klubo de vizaĝharuloj, kiuj de tempo al tempo kunvenas kaj organizas konkursojn pri la plej bela liphararo aŭ barbo. Komence temis nur pri francoj, poste aldoniĝis germanoj, belgoj kaj svisoj. Ĉu diverslandaj esperantistoj emus sendi al ili foton kun sia hara vizaĝo-dekoracio? Ju pli impona, des pli atentinda! Jen ilia adreso:

Association Les Moustachus d'Alsace, 11 rue principale
FR - 68380 MUHLBACH-sur-MUNSTER
Ret-adreso: moustalong@aol.com

*fonto: alvoko de Take - La Domo*

## Mallonge pri...

**Esperanto-grupo de franca urbo** okazigas aranĝon por aliaj grupoj de la urbo. Oni petas poŝtkartojn el ĉiu parto de la mondo ĉe: LA VERDA STELO Esperanto 94, 3 / 507 rue Pablo Picasso, FR-94600 Choisy-Le-Roi

**Informoj pri** centoj da brokantaj kaj malfacile akireblaj verkoj estas troveblaj ĉe

http://www.esperanto.be/fel/but/libl_brk.html

**Interreto - 50 000... kaj kreskas**

Sen granda bruo pasis la informo, ke jam 50 000 e-libroj estas elŝutitaj de eLibrejo. Ĉar tio okazis dum 13 monatoj, tio signifas, ke mezume estis liveritaj al esperantistoj 3846 libroj ĉiumonate. Inter la lastaj aldonoj al eLibrejo, nun ampleksanta 222 titolojn, menciindas LA AVENTUROJ DE PINOKJO de Carlo Collodi, en nova traduko, la antologieto DEK DU AMRAKONTOJ, kiu jam atingis 400 elŝutojn, LA SKANDALO PRO JOZEFO, verko de Valdemar Vinar, originale verkita en Esperanto, kaj MI EN LI de la ĉeĥa verkisto Ladislav Vladyka, kaj multaj aliaj.

eLibrejo ĉe: http://www.esperanto.nu/eLibrejo

**La venontjara IJK** okazos de la 19ª ĝis la 26ª de julio en la Esperanto-domo en Lesjöford (inter la urboj Stokholmo, Oslo kaj Gotenburgo). La temo estos "Al Libera KulturO" (ALKO). Post la IJK eblas buse iri al Gotenburgo por la Universala Kongreso.

## Konsultejo de AdE

Se vi havas lingvan dubon, ne mem solvu ĝin. Antaŭ ol decidi pri la plej bona solvo por vi, demandu Akademion de Esperanto, per mesaĝo al la direktoro de la Konsultejo, ĉe Stefan Maul, rete: smaul86150@aol.com. Akademianoj, kiuj kunlaboras kun la Konsultejo, rapide debatos la peton rete kaj vi rapide ricevos la respondon.
La servo estis uzata dum la pasintaj jaroj en ĉi tiu maniero ĉefe de esperantlingvaj ĵurnalistoj, kiuj troviĝis antaŭ la neceso nomi tre lastatempan aĵon aŭ aferon.
La servo, tamen, funkcias ankaŭ laŭ la tradicia maniero, per letero al:

**Stefan Maul - Pferseer Str. 15,**
**DE-86150 Augsburg, Germanio**



## Skribu al Avo Frosto: li respondos... ankaŭ en Esperanto!

Kristnasko 2002 alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj, ricevas respondon el la norda poluso. Ĉi-jare la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj ties helpantoj.

ESK invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion, skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

**Avo Frosto - Norda Poluso - Hoh Oho**
**Kanado – Canada**

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio, tiel ke la esperantlingvaj infanoj povu skribi al Avo Frosto ĉi-jare. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je

**avofrosto@yahoo.ca**

Se vi planas aperigi artikolojn pri tio kun kristnaskaj ilustraĵoj, vi trovos taŭgajn bildojn ĉe la sekva retejo:

**membres.lycos.fr/avofrosto**

Ni dankas antaŭe se vi povus sendi al ni ekzempleron de revuo, kie la informo aperis.

Normand Fleury, Prezidanto de la E-Societo Kebekia
6358, rue de Bordeaux, Montrealo
Kebekio, Kanado, H2G 2R8

P.S. Estas la unua Kristnasko kiam Avo Frosto uzos Esperanton kaj ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondaĵoj. Ekzemple, li povus erari lingvojn aŭ perdi leterojn. Se bedaŭrinde tio okazos al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭe sendu retmesaĝon al avofrosto@yahoo.ca kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn.

Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

## Kion signifas tiu ĉi vorto?

**ĉapelo** = la vesto de la kapo kaj de kvin literoj de la esperanta alfabeto.
**deficito** = la mono, kiu ne estas en la kaso.
**kongreso** = multaj homoj en granda ĉambro sidas, parolas kaj ne komprenas; **esperanta kongreso** = la sama, sed komprenas.
**ŝlosas** = la lango de la pordo iras en la muron.

Eltiraĵoj el KONVERSACIA VORTARO (marto 1930), verkita de la gelernantoj en la kursoj de Andreo Cseh

## Esperanta enciklopedio

Por movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale gravas la nove kreskanta reta enciklopedio "Vikipedio" ĉe http://eo.wikipedia.com, al kiu devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj motivigo de lernantoj. Posedi en la reto Esperantlingvan informejon pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ĝis nun aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn eblas utiligi ankaŭ dum instruado.

En *Vikipedio*n oni povas skribi ne nur pri ILEI kaj aliaj Esperantaj organizoj kaj eminentuloj, sed ankaŭ pri ĉiuj landoj, iliaj urboj, historioj, vidindaĵoj, artistoj, sciencistoj, bestoj, plantoj, pri ĉio, pri kio kutime informas enciklopedioj.

*Vikipedio* jam ekzistas en 26 lingvoj, la plej riĉa estas la angla (ĉirkaŭ 30 mil artikoloj), sed la nia povas ĝin baldaŭ atingi.

ILEI devus speciale prilabori pedagogiajn temojn (mi kontribuis per artikolo pri Komenio), tiel finfine kolekti ankaŭ la pedagogian terminaron (kvankam el enciklopedia, ne terminara vidpunkto); ankaŭ pri aliaj temoj (geografiaj, botanikaj, kulturaj ks) estus plej taŭgaj kontribuantoj la instruistoj.

En la hejmpaĝo vi trovos konsilojn "Kiel krei paĝon" kaj "Kiel redakti paĝon".

Miroslav Malovec Rete: starto@clavis.cz

## 19ª Internacia Festivalo, jarfine en Germanio

Specifa programo por mezaĝuloj (*2ª generacio*, 25 – 55 jarojn aĝaj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. Jam nun aliĝis 148 personoj el 18 landoj. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, sed laŭdezire oni ofertas paroligajn kursojn, ekzemple por la partner(in)o.

La nunjara 19ª IF okazos en Borken-Gemen/ Germanio. En bela parko troviĝas kastelo, kiu estos via klerigejo kaj manĝejo, kaj en ties proksimeco modernaj dormejoj.

Festivala temo: RELIGIOJ KAJ KONFLIKTOJ. La programo estos tre varia: matene kaj posttagmeze altkvalitaj prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj, kursoj, urbaj vizitoj kaj promenoj. La 30ªⁿ de decembro eblos (fakultative!) ekskursi al la urbeto Xanten (konata pro ĝia arkeologia parko en kiu estis rekonstruitaj domoj, muroj kaj temploj el la romia epoko) kaj al la apuda Kevelaer (pilgrimejo). Vespere okazos fokloro, koncertoj (i.a de Kajto, Nederlando kaj de Mikaelo Bronŝtejn, Rusio), muziko kaj danco. Kompreneble impone ni bonvenigos la novan jaron, kun balo kaj antaŭa silvestra bufedo-bankedo. Nia etosoplena IF-trinkejo KNAJPO jam fariĝis la plej fama en Esperantujo: ĝi disponas je plej diversaj kaj gustumindaj bieroj, vinoj (kun E-etikedo), kokteloj, kafo kaj kukoj. Por infanoj estos aparta prizorgo kaj programo, laŭaĝe.

Pliaj informoj, informiloj, aliĝiloj ĉe la IF-organizanto: Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, De-34303 Niedenstein - Tel./Fakso int.: +49-5624-8007

Retpoŝto: HDP@internacia-festivalo.de

Interreto: www.internacia-festivalo.de


## Januaro 2003: someraj kursoj en.... Aŭstralio!

Ĉu belega varma sunbrilo ne allogas vin? Kial ne forlasi la nordhemisferan vintron por pasigi neforgeseblan tempon en Aŭstralio ĉe la 19ª Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto? Ĝi okazos inter la 5ª kaj la 17ª de januaro 2003 en la mirinda urbo Melburno.

Instruprogramon zorgos plej kompetentaj profesiaj instruistoj: Penny Vos, Franciska Toubale, Grazina Opulskiene, Marcel Leereveld kaj Atilio Orellana Rojas. Krome estos ofertataj tre diversaj okupiĝoj: kantado, kreema verkado, ludoj, informatiko ka. Vespere okazos interesaj prelegoj, dancado kaj vizitoj al lokaj drinkejoj. En programo ankaŭ interesaj ekskursoj. La kotizo estas proksimume eŭroj 100, loĝloko po 25,00 eŭroj nokte (kaj tio inkluzivas 3 bonajn manĝojn!)

Por pliaj informoj kaj aliĝoj turniĝu al:

Jennifer BISHOP - Faculty of Education, PO Box 6, Monash University, AU-Victoria 3800, Aŭstralio, Tel +61 3 9818 7358 kaj +61 3 9905 2806, fakso +61 3 99-05 3668 - esperanto@Education.monash.edu.au




### Nova Plena Ilustrita Vortaro jam ĉe UEA-Libroservo

La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigitaj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT. La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ eŭroj 78,00 plus la kutimaj aldonaĵoj: 10% por sendokostoj; 6% por imposto (nur por EU-landoj). Per mendoj de 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) la LibroServo donas sesonan rabaton (16,66%). Ĉe T.E.A. haveblas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj.

**PIV-kampanjo**

"Aĉetu la novan PIV kaj donu vian malnovan al la samideanoj, kiuj ne havas la rimedojn, kiel en la 3ª mondo". La partoprenantoj de la brazila UK jam povis mem kunporti ĝin al Fortaleza kaj tie ĝin doni laŭ propra elekto. Oni petas al la libro-servoj subteni tiun agadon. UEA, ILEI, IEI kaj multaj landaj organizoj, certe regule havas la okazon transdoni la librojn al vizitantoj de aŭ vojaĝantoj al tiuj landoj. *Eddy Raats - Rete: eddy.raats@pandora.be*

## Kvizoj pri Esperanto



1. Kiel nomiĝis la edzino de Lazaro Ludoviko Zamenhof?
2. Kia estas la nomo de la biblioteko de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO?
3. Kiuj kaŭzis la IDO-skismon?
4. Kun kiu fondis Andreo Cseh la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto en Nederlando?

Inter tiuj kiuj havigos al la TEA-sekretario, antaŭ la 31ª de decembro 2002, la korektajn respondojn, skribe, rete, rekte, fakse aŭ telefone, estos lotumita interesa esperantaĵo. Solvo kaj anonco pri la gajnint(in)o aperos en la januara TEA-Bulteno.

Parto de la informoj fontas el RET-INFO kaj NOVA SENTO.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349